



6* 1991*147

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Esperantistoj renovigis la monumenton de L.L. Zamenhof
en Františkovy Lázně - legu sur la paĝo 8

Jan Neruda:

Romanco de Kristnaska tago

Petro sur la liton falas
kaj tuj sonĝo lin vualas.
Kaj li vidas: la pejzaĝo
en plej hela lumo staras.

Petro gapas en konsterno:
Simpla stal' kun familio,
kaj jen - li apenaŭ spiras
knabo kiel Sun-radio.

Anĝeletoj svarmas, brilas,
flugpetolas tra aero,
ĉiu kantas Halleluja,
kiel scias nur anĝelo.

Petro vidas nun alkuri
vilaĝanojn, kaj ĵupili:
Marĉas viroj, marĉas fraŭloj,
muzik-bando antaŭ ili.

Vaŝek irapan la tamburon,
Martin arĉas, Matej blovas,
Vojta fajfas per klarneto,
Kuba fajfil-bakon movas.

Ludas ili, aĥ, aŭdinde,
pufaj vangoj, man' flugetas...
Al li ŝajnas, ke la kruroj,
mem en dancon salti pretas.

Fino. Elviciĝas Brihta,
glatrazita, en dekoro,
eksa kaporal' ulana,
nun solena oratoro.

Li sin streĉas, tuŝas ĉapon:
"Kristo!" Li parolon tenas,
"Ni ne konas sanktajn skribojn,
sed ni scias, kio venas.

Vi...Ne! Mi...Ne! Jes! Ni ĉiuj
estas - sciu - por Di-gloro..."
Nun li stumblis: Plumba lango
trovas truon en memoro.

Lia lipo time tremas,
lia pugno prem-rigidas,
"Hontu!" Petro el la sonĝo
laŭte al ulano krias.

Sed Jesuo alridetas:
"Vi infanoj estas bravaj.
Post la mort' animoj viaj
hop! Ĉielen flugos savaj."

Nun alvenas ĥor' kantanta,
la mastrinoj al omaĝo,
kaj en sako, korboj portas,
kion havas la vilaĝo.

Mielkukojn, pomojn, kremon,
tolon, kion ajn necesas...
Jozef prenas la donacojn,
kaj Maria kape jesas.

Sed nun kio? Petro sonĝe
gapas procesion plian:
Dek du virgulinaj gvidas
per rubando la dektrian.

Ĉarmaj kiel dek du rozoj.
"Ho, vi Infanet' ĉiela,
ni venigas al vi Anjon,
ĉar ĝi estas la plej bela."

"Jes ja! Prave!" grumblas Petro
"Jen ĝi estas. Povas ja vi
de ĝi - anstataŭ de ĉiuj
mieldolĉan kison havi."

Kaj Aninjo proksimiĝas,
klinas sin kun bona volo.
Jesueto tuj la brakojn
krucas ĉirkaŭ ŝia kolo.

Aj, li ridas, ŝin karesas,
ŝin al sia brusto premas,
ricevinte unu kison,
jam la plian havi emas.

Petro sur la lit' baraktas
kiel urso en kaptilo.
"La patrino ne protestas?
Tiel edukiĝas filo?"

Tradukis el la ĉeĥa
JUDr. Tomáš Pumpr
13.11.1952

Co rok dal

Rok 1991 byl jedním z nejtěžších v dějinách našeho svazu, protože ekonomická reforma dopadla i na naše hnutí. Mnohé kluby a kroužky ztratily střechu nad hlavou, nebo se musely velmi uskrovnit. Totéž se týká i sekretariátu svazu, který se nachází uprostřed Prahy, tedy v oblasti, kde nájemné nebytových prostor bylo nejkřutěji zvýšeno. Z hlediska propagace i prestiže našeho svazu však nebylo vhodné vyměnit tyto místnosti za lacinější periferii. Jako řešení byl přizván ke společnému užívání "spolunajemník", kterým se stala cestovní kancelář Tourgast.

Na druhé straně se v květnu uskutečnila snad nejúspěšnější akce ve 22-letém životě svazu, totiž 43. světový kongres esperantistů-železničářů (kongres IFEF) v Olomouci, kterého se zúčastnilo 380 esperantistů z dvaceti zemí. Byl hodnocen v esperantském tisku jako vynikající a posílil i ekonomickou situaci svazu. Umožnil mimo jiné vydávat názory na to, co je v časopise zajímavé a na co by se redakce měla zaměřit. Nejméně ze všeho nás pak uspokojuje polygrafická uroveň. Tisk textu připravovaného na počítání na mozaikových tiskárnách (pišicích jehličkami přes barvici pásku jako u psacího stroje a sestavujících znaky z mnoha drobných teček) mají písmo nedostatečně čitelné, což se ještě zhoršuje v dalším postupu přípravy tisku fotografováním takto zhotovené předlohy. Měl by pomoci tisk předlohy tiskových stran na laserové tiskárně. V zásadě je to tedy otázka technického vybavení a také dostatečných finančních prostředků na ně.

Jsem si vědomi toho, že kvalita Starta poklesla, což mělo jistě vliv i na pokles členské základny. Z klubů přicházelo málo příspěvků o činnosti, takže stránky byly vyplňovány "vycpávkami". Je ovšem také pravda, že se velmi liší názory na to, co je v časopise zajímavé a na co by se redakce měla zaměřit. Nejméně ze všeho nás pak uspokojuje polygrafická uroveň. Tisk textu připravovaného na počítání na mozaikových tiskárnách (pišicích jehličkami přes barvici pásku jako u psacího stroje a sestavujících znaky z mnoha drobných teček) mají písmo nedostatečně čitelné, což se ještě zhoršuje v dalším postupu přípravy tisku fotografováním takto zhotovené předlohy. Měl by pomoci tisk předlohy tiskových stran na laserové tiskárně. V zásadě je to tedy otázka technického vybavení a také dostatečných finančních prostředků na ně.

Nedostatek financí u obyvatelstva a záplava angličtiny a němčiny se projevil i v třetinové účasti na Letním esperantském táboře v Lančově a jistě tuto situaci pocítili i místní skupiny. Co v této situaci dělat? Jisté je, že i když se hodně lidí dokáže naučit anglicky, německy, nebo francouzsky dobře, nebo aspoň na uspokojující úrovni, je ještě více těch, kteří to nedokáží. Z nich se mnozí nedokáží naučit ani esperanto a zůstávají věčnými začátečníky a opouštějí záhy hnutí, ale mezi těmito dvěma skupinami se nachází většina, pro kterou by esperanto mohlo být tím pravým řešením. Problém je, že tato většina si toho není vědoma a mnohdy o existenci, úloze a významu esperanta není dobře informována. V této souvislosti je nutno podotknout, že nemá smysl propagovat esperanto například haněním angličtiny, protože většině lidí to připadá asi tak, jako kdyby výrobce bicyklu Favorit pomlouval Škodu Favorit. Taková reklama se obrátí nutně proti esperantu. Jenže tak jako mnoho lidí na automobil Favorit nemá, nebo třeba i má, ale přesto se jim vyplatí nakoupit a složit do kufru také nějaké to šlapací dvoukolové zařízení pro výlety do přírody, tak ani úspěch angličtiny a němčiny není důvodem k tomu, aby se přestalo používat také esperanto. Zděrazňuji - také. Naše okolní neesperantské prostředí právem

není ochotno přijmout esperanto jako náhradu a konkurenta angličtiny, ale můžeme je naučit, aby je přijalo jako doplněk a spolupracovníka vedle těchto jazyků. Na otázku: - "Myslíte si, že má dnes esperanto proti angličtině šanci?" - lze asi nejlépe odpovědět: - "Ne proti angličtině, ale s angličtinou. Bylo experimentálně dokázáno, že děti, které začaly s esperantem, se snáze učí další jazyky. Při stejné námaze lze esperanto zvládnout dříve a je to zároveň i šance pro ty, kteří při studiu jiných jazyků neuspěli."

Největší překážkou pro šíření esperanta je tzv. idea "konečného vítězství". Nejenže nepříjemně připomíná "konečné vítězství komunismu" a navozuje tak nežádoucí asociace, ale především navozuje myšlenku, že tedy není třeba se esperanto učit, dokud tohoto vítězství nedosáhne. Jenže když se ho lidé nebudou učit, tak jakéhokoli vítězství nelze dosáhnout, takže je to utopie. Tímto způsobem sami vytváříme bludný kruh. Tak jako je užitečný již zmíněný bicykl Favorit vedle svého čtyřkolého jmenovce, tak i esperanto je užitečné i ve stínu světových jazyků. Chceme-li, aby se lidé učili esperanto už nyní a nečekali až na nějaké vítězství v budoucnosti, musíme jim ukázat, že i dnes, bez konečného vítězství, je esperanto užitečné a má smysl a cenu ho znát. Nesnižujeme cenu toho, co jsme skutečně dosáhli, tím, že budeme lidem předkládat před oči obraz toho, co jsme dosáhnout chtěli, ale nedosáhli.

Nepodařilo se nám bohužel uhájit světový kongres esperanta 1992 v Praze jako součást oslav 400 výročí narození J.A. Komenského, ale uspořádáme alespoň předkongres s tímto námětem. Podle stanoviska UEA se světový kongres esperanta do roku 2000 v Československu přece jen uskuteční, až se zklidní ekonomická situace. V Bratislavě se pak po kongresu bude konat světová konference esperantských učitelů ILEI. Naši vlastní členové si často nedostatečně uvědomují, že Český esperantský svaz tvoří především oni sami a ne pouze sedmičlenná Rada, tím méně pouze tajemník. Takže pokud se všechno nechá jen na nich, nemůžeme očekávat žádné zázraky. I železničářský předkongres v Praze však byl ponechán z valné části na jednom člověku. V tisku pak sekretariát svazu přijal pomoc Radikální strany s počítačovým zpracováním přehledu a adres členské základny včetně tisku adresních štítků pro rozesílání Starta. Radikální strana pak rozeslala členům svazu své materiály, což vzbudilo u některých členů nevoli, tak jako kdysi budily odpor reklamy ve Startu, i když právě ony umožňovaly kvalitní tisk Starta bez nutnosti zvýšit předplatné, ačkoliv rostla cena papíru i polygrafických prací.

V příštím roce se zvýší význam Starta, ale i Esperantisto Slovaka, jako dvou esperantských periodik dosažitelných za přijatelné ceny. Vždyť cena Herolda stoupá na 350 Kčs, revue Esperanto bude stát 600 Kčs a dokonce i Juna Amiko má stát kolem 270 Kčs, pokud zcela nezaničme. (Je to způsobeno přepočtem na dolary, čímž se cena časopisů zvyšuje na dvacetinásobek, takže uvedené ceny jsou vlastně "levné".) Starto tak bude vlastně zastávat pro naše členy funkci několika zahraničních periodik. Zda to zvládneme, bude záležet i na spolupráci redakce s kluby, místními skupinami i jednotlivci.

K úspěchům letošního roku patří založení sekce dětí a také první dětská členové svazu (dnes asi třicet dětí do 14 let). I pro ně musíme v příštím roce vyhradit rubriku a najít vhodnou obsahovou náplň. Také pro naplnění tohoto úkolu hledáme obětavé pomocníky.

Doufáme, že se v příštím roce podaří vydat Kožíkův román o Komenském s ukázkami z díla velkého pedagoga a myslitele (v esperantu), snad i jeho myšlenky o mezinárodním jazyce (pro veřejnost česky). V příštím roce by mělo být také dokončeno přepracování rukopisu nového kapesního slovníku podle připomínek recenzentů (1200 strojopisných stran).

Věříme, že se ekonomická situace v novém roce postupně trochu uklidní a že my esperantisté a čtenáři Starta, spolu s vedením ČES a s redakcí, se přičiníme jak o bohatší esperantský život, tak i o bohatší obsah našeho časopisu.

(redakce Starta)

45. letní esperantský tábor v Lančově 1992

5.7.1992	-	18.7.1992	-	první etapa,
19.7.1992	-	1.8.1992	-	druhá etapa,
2.8.1992	-	15.8.1992	-	třetí etapa.

Poplatek pro členy ČES a ZES:

Kdo se přihlásí a zašle zálohu do:	mládež do 18 let a studenti:	ostatní:
15. ledna 1992	Kčs 900,-	1 100,-
15. března 1992	1 000,-	1 200,-
15. června 1992	1 100,-	1 300,-
po 15. červnu 1992	1 200,-	1 400,-

Nečlenové svazu do 18 let a studující zaplatí 1200 Kčs, ostatní 1500 Kčs; za účast dětí od 6 do 10 let s doprovodem 800 Kčs. V případě dalšího pohybu cen potravin a služeb provozovatel výši poplatku upraví.

Přihláška je platná po složení zálohy 800 Kčs, případně po zaplacení celé částky.

Přihlášky i platby zasílejte na adresu ESPERANTO, 674 01 Třebíč.

Oslava 45. výročí konání Letního esperantského tábora se uskuteční v sobotu dne 11. července 1992. V 17,00 hodin slavnostní nástup s krátkým projevem předsedy EK; pozdravy hostů. Promítání diapositivů z minulých ročníků LET - vzpomínky účastníků.

Magnetofonová služba svazu


Vedením magnetofonové služby našeho svazu byl pověřen Josef Filip, Nádraží ČSD 146, 768 11 Chropyně. Chcete-li získat nahrávky, postup je tento: Nejdříve si na svazu nebo u pana Filipa seženete pětidílné svazové složenky a zaplatíte natočení - za 1 kazetu 20 Kčs. Potom mu pošlete balíček, ve kterém bude pátý díl zaplacené složenky a tolik kazet, kolik jste si zaplatili (nebo kotoučový pásek odpovídající délky), a samozřejmě i přesné údaje, které nahrávky chcete natočit. Dávejte dobrý pozor, jakou délku jednotlivé nahrávky mají. Stává se, že lidé posílají 60-minutové kazety a chtějí natočit 90-minutové nahrávky. U mnoha položek v seznamu jsou uvedeny dvě nahrávky, z každé strany kazety jedna. Není problém vyžádat si, aby na jednu kazetu byly natočeny jiné kombinace nahrávek, jen své přání musíte formulovat jasně a srozumitelně. Příjemnou zábavu a účinné studium!

SEZNAM NAHRAVEK

1. Esperanto programita (kurs z Paderbornu - Německo)	60 min.
2. Esperanto junulkurso (francouzský kurs)	60 min.
3. Monologo kaj kantoj (zp. F. Jagher, O. Tzaut, M. Fasani)	60 min.
4. Vyslanci naŝi kultury (rozhlás. pořad)	
Pisničky z Itálie (zp. S. Kastelviva, M. Fasani)	60 min.
5. Rozhovor s J. Kořínkem	
Ukázky z díla J. Kořínka	60 min.
6. Internacia lingva situacio (přednáška E. Bokareva)	60 min.
7. Konfronta komparo de Esperanto al etnolingvoj (D. Blanke)	60 min.
8. Historio de C.E.D. (I. Lapenna)	60 min.
9. Ekskurso de mortintaj knabinoj (monolog E. Seemannové)	60 min.
10. Tehnikaj vortoj en Esperanto (přednáška - Fritsch)	
ISAE - apliko en Esperanto (Kavka)	60 min.
11. Komputilo proksimiĝas al la homo (počítače v esp.)	60 min.
12. Pohádky (přeložil a čte M. Malovec)	60 min.
13. Učebnice ABC (čte M. Malovec)	60 min.
14. Veselin Damjanov - písně a árie	
Pisničky z Litvy	60 min.
15. Tra la mondo. (pisničky, zp. O. Tzaut)	60 min.
16. Bulharské a jugoslávské písníčky	60 min.
17. + 18. A. Pettyn: Ĉu vi parolas esperante? (konverzační kurs na dvou kazetách)	2 x 60 min.
19. Pisemný kurs J. Cinka	60 min.
20. J. A. Komenský (přednáška V. Novobilského)	60 min.
21. E. Urbanová: Versoj kaj larmo (recituje E. Seemannová)	90 min.
22. Zpívají J. + A. Lepuil a A. Tomecki	60 min.
23. Zpívají J. + A. Lepuil a O. Tzaut	
Zelená hvězdička (pořad o ostravských esperantistech)	60 min.
24. 100-jarigo de Esperanto (hovoří A. Pettyn a A. Tomecki)	
Pisničky o Varšavě (zp. A. Tomecki)	60 min.
25. Vánoční koledy (zp. soubor Muzilanoj)	
Recitace - E. Seemannová + písníčky J. Dinnyése	90 min.

26. Vodácké písničky (zp. J. Skropuski)	60 min.
27. Esperanto Praha (rozhlás. pořad)	
Český houslista J. Slavík (hovoří J. Vondroušek)	60 min.
28. S. Schulhoff (přednáška členů pardubického klubu)	
Vzorová vyučovací hodina (1. lekce ABC)	
Jak používat -igi a -igi (T. Kilian)	90 min.
29. Esperanto a já (rozhovor s T. Kilianem)	60 min.
30. Zpívá čínská zpěvačka Lin Fang	
Ni vivos (hra o L. Zamenhofové)	90 min.
31. Jak překládat do esperanta (J. Vondroušek)	
Holka na vdávání (od M. Švandrlíka přeložil a čte J. Vondroušek)	60 min.
32. Osmdesátiny T. Kiliana (Kilian, Vondroušek, Vitek, Křimský ...)	90 min.
33. Gramatika v písničkách (zp. J. + J. Atkinson)	
Známé melodie	
Zpívá Jana Cikalová	

Nestoro de E-movado



Prof. Gaston Waringhien festis en julio 1991 sian 90-jariĝon. Kun Zamenhof, Kalocsay kaj Lapenna verŝajne la plej granda persono de la Esperanto-movado. Kunaŭtoro de Plena (Analiza) Gramatiko, ĉefa aŭtoro de Plena Ilustrita Vortaro, aŭtoro de la famaj Eseo kaj de poemaro Duonvoĉe. Kun Kalocsay li tradukis "La Floroj de malbono" de Charles Baudelaire kaj verkis erotikan poemaron, sisteme ŝokan, nun klasikan "Libro de amo" (Peter Peneter = Kalocsay, Georgo Peterido Peneter = Waringhien).

Esperantský klasik

Letos v červenci se dožil 90 let profesor Gaston Waringhien, jedna z největších osobností v dějinách esperanta. Epochální jsou především dvě jeho práce: největší esperantský výkladový slovník Plena Ilustrita Vortaro kaj nejpodrobnější mluvnice, kterou zpracoval současně s Kolomanem Kalocsayem

Honoraĵ membrinoj de ĈEA

*** Alena Růžicková-Pavlinová

kiu naskiĝis la 8-an de julio 1910, estas aktorino de la teatro "fratoj Mrštík" en Brno kaj profesorino de JAMU. Kiel multjara esperantistino, membrino de la Esperantista Klubo en Brno, ŝi preparadis kulturajn vesperojn en la klubejo, prezentadis poezion kaj ankaŭ prozon, ekzemple la apokrifojn de Karel Čapek en la traduko de Josef Vondroušek. Ŝia deklamado kompletigadis koncertojn de la artistoj de Janáček-operejo kaj konservatorio por klubanoj. En sia aktora kaj pedagogia laboro ŝi disvastigadis la ideojn de la esperantismo, eĉ de la scenejo antaŭ la publiko de specialaj spektakloj okaze de siaj vivjubileoj. Estas domaĝe, ke ni sukcesis surbendigi nur kelkajn pecojn el ŝia Esperanta repertoaro kaj ke ŝia sano ne obligas enmagnetofonigi ĉion.

*** Marie Bartovská

nask. 1912-07-29, estas tre aktiva membrino de la scienc-teknika sekcio kaj de Esperanto-Klubo en Frydek-Místek kaj motoro de la kafejo Esperanto. Signifan parton de sia esperanta laboro ŝi dediĉis al faka publikado kaj terminologio en la tekaŝ-industria fako. En tiu sfero ŝia nomo transpaŝis la limojn de nia lando jam longe antaŭ la fondiĝo de ĈEA. Ŝi figuras inter la kunaŭtoroj de la Plena Ilustrita Vortaro (1970) kaj Esperanta Bildvortaro (1988). Por la scienc-teknika sekcio ŝi prizorgis la fakan bibliotekon. Fervore ŝi instruas kaj propagandas Esperanton, ankaŭ eksterlande, ĉar argumentoj de eksterlandanoj estas kutime akceptataj pli favore ol de samlingvanoj.

M.M.

Kunveno de esperantistoj-handikapitoj

kaj memortabulo al Zamenhof

En bela medio de la banurbo Františkovy Lázně realiĝis de la 14-a ĝis la 20-a de oktobro 1991 kunveno de esperantistoj - handicapitoj kun internaciaj vizitantoj. Alvenis 48 homoj. El siaj modestaj rimedoj ili igis fari memortabulon omaĝe al D-ro L.L.Zamenhof kaj instaligi ĝin sur la loko, kie de la jaro 1914 staris la unua en la mondo E-monumento, detruita en 1938 de nazioj. Ĝis nun la gesamideanoj vane kolektas monon por rekonstrui la monumenton. La neriĉaj handicapuloj montris al ili la vojon per sia ekzemplo. La kunveno estis sukcesa, ĉar handicapitoj denove povis travivi komune interesan semajnon kaj plifortigi siajn sciojn de Esperanto. Por multaj ĝi estas sola ĝoja okazo, kiun ili atendas dum la tuta jaro, tamen la ĉijara renkontiĝo ne estis tiom gaja, ĉar nin forlasis nia kara samideanino Jana Malínská, kiu preparis la renkontiĝon.

Zdenka Novotná

Pri novaj Esperantistaj gazetoj

Albana Esperantisto

En marto 1991 fondiĝis Albana Esperanto-Ligo (AEL), kiu en julio eldonis la unuan enkondukan numero de sia organo **Albana Esperantisto**. Temas pri modesta kajero 16-paĝa kun pluraj tajpitaj tekstoj paralele en Esperanto kaj en la albana, kun du poemoj kaj paĝo de humoro, sed ni ĉiuj scias, en kiom malfacilaj kondiĉoj la albanaj samideanoj laboras. AEL nun asociigas ĉirkaŭ 230 membrojn en la urboj Tirana, Durrës, Kukës, Shkodër kaj Korçë. Kunlaboron ili jam subskribis kun la Makedonia E-Ligo. Por 10 usonaj dolaroj ili vendas 190-paĝan lernolibron kun 2200 vortoj en Esperanto, la albana, angla, franca kaj germana lingvoj. La provizora adreso: Albana Esperanto-Ligo, Gafur Muço, Rruga "Thanas Ziko" nr. 56, Tirana, Albanio.

Arizona Suno

estas nova kvaronjara kulturbulteno pri la usona ŝtato Arizona, ankaŭ 16-paĝa, dense tajpita. La unua numero alportas artikolojn pri la ĉikana literaturo (ĉikano estas meksikodevena hispanlingvano edukita en anglalingvaj usonaj lernejoj), pri la arizonaj neĝbirdoj, pri librobazaroj, pri la arizona minurbeto Tomboŝtono (Tombstone) kaj eble la plej interesa pri la lingvokrizo en arizonaj indianaj rezervejoj: la indianoj forgesas siajn popolaĵajn lingvojn kaj ofte nur magnetofonaj surbendigoj de maljunulaj voĉoj savas kelkajn indianajn idiomojn antaŭ absoluta malapero. Adreso: Edveno Grobe, Redaktoro; 1620 No. Sunset Drive, Tempe, Arizona 85281, Usono.

M.M.

Ni kondolencas

Forpasis Jana Malínská

La tutan vivon ŝi dediĉis sin al agado inter handicapuloj. Ŝi mem, handicapita, devis antaŭtempe emeritiĝi. Sed eĉ tiam ŝi ne ĉesis labori por bono de handicapitaj kuncivitanoj. Kiel funkciulino de Asocio de Invalidoj kaj de esperantistoj-invalidoj ŝi dediĉis sian tutan tempon al tiu ĉi agado kun entuziasmo kaj ofereco al ŝi propraj. Eminenta koleginino kaj kunlaborantino faris multon por progreso de nia movado kaj meritas nian sinceran, profundan dankon. Ŝi forpasis neatendite, silente kaj modeste, en dimanĉo, la 22-an de septembro 1991, frumatene. Modesta eĉ je sia lasta horo, ŝi ne deziris havi publikan funebran ceremonion. Do ni adiaŭas sinjorinon Jana Malínská almenaŭ ĉimaniere.


(ing. V. Špaček)

Al kiu gento apartenis d-ro L. L. Zamenhof ?

Bernard Golden

Trafoliumante diversajn publikaĵojn en Esperanto kaj en etnolingvoj - propagandilojn, didaktikajn verkojn, historiojn de Esperanto, biografiojn pri Zamenhof - oni trovas jen mankon de precizaj informoj pri la genta apartenado de Zamenhof, jen kontraŭdirajn "faktojn". La plej oftaj karakterizoj estas "la pola d-ro L. L. Zamenhof", "la pola okulisto" kaj "la pola kuracisto". De tempo al tempo oni nomas lin ruso. Malofte oni diras la veron: li estis judo (aŭ hebreo, laŭ la malnova lingvouzo).

Zamenhof ne povas esti membro de la pola gento. La aŭtoro de Esperanto mem difinis la vorton "gento" jene: "la aron de ĉiuj homoj, kiuj havas saman devenon kiel mi, mi nomas mia gento". Plena Ilustrita Vortaro (PIV) difinis "pola" jene: "ano de ĉeĝigento loĝanta en Polujo". En pluraj verkoj Zamenhof klarigas, ke li apartenis al minoritata gento en Polujo; sekvas, do, ke li ne estis ano de la pola ĉeĝigento. Li neniam povis esti eĉ civitano de Pollando, ĉar la sendependa respubliko estiĝis nur post la morto de Zamenhof en 1917. Dum sia tuta vivo Zamenhof estis regato de la cara Rusia Imperio. Zamenhof konstatis pri la estiĝinta konfuzo kaj eksplacite neis sian polecon. En letero sendita al la Loka Kongresa Komitato de la UK en Krakovo en 1912, Zamenhof skribis: "(...) ne nomu min 'pola' por ke oni ne diru, ke mi - por akcepti honorojn - metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas (...) laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento hebreja" (la emfazo estas



de Zamenhof).

En poŝtkarto sendita al s-ro Theodor Ĉejka el Bystřice pod Hostynem en 1906, Zamenhof informis, ke lia nacio estas "ruslanda hebreo", lia religio "hebrea-hilelista" kaj la "lingvo de mia gepatra domo estis la lingvo rusa". Rimarku: hejme li ne parolis la polan lingvon. Plue, la familia nomo "Zamenhof" ne estas pola. En letero al berlinaj esperantistoj en 1904, Zamenhof klarigis, ke ĝi estas germana nomo (originale Samenhof), kiun li fonetike transkribis per "z".

Jam estis publikitaj pluraj fotografiaĵoj, tajpitaj kopioj kaj tradukoj de oficialaj ruslingvaj dokumentoj, kiuj plej objektivite pruvas, ke Zamenhof estis judo. Lia naskiĝo estis registrita en la matri-

kulibro de la Juda Komunumo de la urbo Bjalistoko kun indiko ankaŭ de la dato de cirkumcido. La "Atesto pri Matureco", kiun la juna gimnaziano ricevis en 1879, komenciĝas per la sekvaj vortoj: "Tiu ĉi estas donita al Lazar Zamenhof, de la Hebrea konfesio (...)".

Kvankam ekde la unuaj jaroj de la historio de Esperanto Zamenhof neniam kaŝis sian judecon, aliaj homoj intence pri-silentis tion. Kial? La respondo estas simpla: pro daŭra judofobio kaj antisemitismo en kaj ekster la Esperanto-movado.

Rimarkigo pri la nomformoj:

Efektive, Zamenhof mem respondis pri la konfuzo - se ĝi ekzistas - ĉar li plurfoje ŝanĝis la nomformon. Lia "plej-plej" unua nomo estis la hebrea "Eliezer". Ĝi estis oficiala nomo. Por ĉiutagaj celoj estis uzata la jida ekvivalento "Lejzer". Kun tiu nomo Zamenhof eniris la vareŝovian gimnazion en 1874. Sur la lernejaj dokumentoj ĝi aperas azbuke kiel **Лейзер**.

Sur dokumento de la jaro 1876, kiam Zamenhof estis en la 6-a klaso, aperas la nomo "Lazar" (**Лазарь**). Tamen, kelkaj posaj dokumentoj havas la nomformon "Lejzer". En 1879 Zamenhof mem subskribis "Lazar", sed samjare ankaŭ "Lejzer". Poste denove "Lazar". Kiel universitatano li fariĝis "Lazar Markoviĉ Zamenhof". /aŭtoro/

Rimarkigo de la redaktoro:

La klarigon ni povas kompletigi laŭ la "Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof" (1982) de la japana aŭtoro Ludovikito (p. 11): Je la fino de la 19-a jarcento aldoniĝis pli ĝenerala nomo "Ludoviko" kaj li nomiĝis Lazar Ludoviko Zamenhof.

Autor esperanta se naskiĝis en 1859 en polskem Bjalystoku jako poddaný ruského impéria a zůstal jím po celý život, protože teprve po jeho smrti (zemřel 1917) získalo Polsko samostatnost. Nebyl však národnosti polské ani ruské, přestože se u nich doma mluvílo rusky (chtěl být ruským básníkem!), nýbrž židovské. Jeho otec byl učitelem cizích jazyků a jmenoval se Marek Zamenhof. Toto německé jméno se původně psalo Samenhof, avšak v ruštině i esperantu získalo počáteční Z. Slavný syn byl po narození obřezán a získal jméno Eliezer, které v domácím prostředí bylo vyslovováno v podobě Lejzer. V ruských psaných dokumentech, např. na maturitním vysvědčení, je uváděn jako "Lejzer Markovič Zamenhof, židovské konfese". Do esperanta se však přepisoval jako Lazaro Zamenhof. Ke konci století přijal i polské jméno Ludwig, přepisované do esperanta jako Ludoviko. Na rozlišení od bratra Leo Zamenhova, který se stal také populárním esperantským autorem, se začal podepisovat L.L.Zamenhof, aniž někdy své jméno vypsál celé, takže nelze říci, zda byl Lazar Ludvík nebo Ludvík Lazar. Jméno Ludoviko však dosáhlo takové popularity v esperantském světě, že je tak všeobecně nazýváno, i když se hovoří o jeho dětství a mládí, kdy toto jméno neměl, ani netušil, že je někdy bude mít. I v tom se projevuje vliv antisemitismu, kvůli kterému byla dlouho zamlčována Zamenhova židovská národnost i jeho židovské jméno, z obav před negativním dopadem na popularitu esperanta. Vystudoval medicínu v Moskvě a Varšavě, ve Vídni získal oční specializaci, bydlel ve Varšavě, proto bývá mylně označován za "polského očního lékaře". (red.)

Miroslav Malovec:

Du recenzoj pri la sama temo

Renato Corsetti: SLOVNÍK HANLI-VÝCH VÝRAZU V ESPERANTU (Vortaro de fi-esprimoj en Esperanto), el la originalo KNEBU MIN, SINJORINO tradukis kaj adaptis Petr Chaloupka, eldonejo KLA-VIS, Praha 1990, 32 paĝoj, formato A5, 2000 ekzempleroj, vendebla sole en ĈSFR, 34 Kčs

Hektor Alos, Kiril Velkov: TABUJAJ VORTOJ EN ESPERANTO, Vraca 1991, 32 paĝoj, formato A6, prezo 6,60 gld (+ sendokostoj) havebla ĉe UEA

Ĉiu vivanta lingvo posedas apud sia kultivita literatura formo ankaŭ tavolon vulgaran, burstratan, kiun parolas simplaj kaj eĉ kleraj personoj en ĉiutagaj situacioj. La vulgara lingvo forigas el la parolo afektan oficialecon kaj ceremonian hipokritecon anstataŭigante ilin per sincera intimo kaj varma familiareco.

Insultoj ebligas esprimi biantajn emociojn. Junularaj slangaĵoj kaj krimulaj argotaĵoj kapablas trafe, kolorriĉe kaj koncize pentri bildojn, por kiuj la kodifita stilo posedas nur sekajn, grizajn, longajn aŭ rigorajn rimedojn. Maldecaj kaj trivialaj vortoj permesas al ĉiu homa birdo kanti laŭ sia propra natura beko. Ĝuste la neoficiala, popola tavolo de lingvo, supozata kiel ne imitebla arte, estas ĝenerale konsiderata kiel mezurilo de lingva vivkapablo kaj naturreco. Neesperantistoj plej ofte demandas, ĉu Esperanto posedas tiun lingvotavolon, kaj - konvinkitaj ke ne - esperas doni al la ideo de artefarita lingvo mortigan baton. Sed ankaŭ tradukistoj de belestro sentas bezonon de vulgarecaj kaj trivialaj esprimoj, se tiaj troviĝas en la originalo, priskribanta la veran vivon de veraj homoj. Ti-

al, malgraŭ protestoj de kelkaj samideanoj, ke Esperanto ne bezonas tiajn "huliganaĵojn", ili tamen aperas kaj penetras en la internacian lingvon.

La verko de Renato Corsetti preskaŭ science aranĝas kaj klasifas mil esprimojn de slangeca karaktero en plurajn kategoriojn kaj grupojn. Ĉe ĉiu vorto troviĝas klarigo de ĝia uzeblo: insultoj (fuĝnaskito - kontraŭ homo pro stulteco, sentaŭgeco), sakroj (ie la diablo! - por esprimi ekkomprenon), onomatopeoj (ĉirĉir - ĉirpo de cikado), tabuaj vortoj (ĝemmi - sekse ludi), metaforoj (tria kruro - penis), slangaĵoj (ĝesinjoro - longhara knabo), kunmetitaj esprimoj (disĝ-miso - senorde). La aŭtoro mencias 32 kunaŭtorojn kaj konsultitajn verkojn, certigas, ke envicigitaj primoj estas vere uzataj, ĉefe dum junularaj renkontiĝoj, rifuzas vortojn nur literature elpensitajn aŭ kontraŭfundamentajn. -

La "Tabuaj vortoj en Esperanto" de H. Alos kaj K. Velkov disvolvas kaj riĉigas la plej tiklan kaj tabuan parton de la Esperanta vortprovizo, nome esprimojn obscenajn kaj maldecajn, rilatajn precipe al seksaj aferoj. Ankaŭ tiu ĉi verko konsistas el pluraj partoj. Post vorareto kun ĉ. 230 fivortoj sekvas sinonimoj por la seksorganoj, vortludoj (mastro - kastro), sakroj (ek al fek!), invitaĵoj foriri (feken!, putru for!), mal-esprimoj (malvizaĝo = pugo) kaj la broŝureton fermas ses pikaj poemoj de alta poezia valoro. La du libretoj estas certe ne malhaveblaj por ĉiuj, kiuj volas Esperanton regi, precipe por beletristoj, instruistoj (lernantoj ĉiam forte interesiĝas kaj vigliĝas ĉe fi-lecionoj), propagandistoj kaj junularaj aktivuloj.

Esperanto-redakcio de Aŭstria Radio Internacia proponas:

Listo de niaj propraj (kaj kelkaj aliaj) eldonaĵoj, senpage, kun indiko de la nombro da "mendoj", t.e. tiucelaj, por ĉiu titolo apartaj alskriboj necesaj, por ke ni sendu ilin.

Porinfanaj poemoj de E.Lippe, presita, 4-paĝa	1 mendo
Aŭstria Ŝtatprezidento F.Jonas kiel e-isto de E.Rixner, presita, 8-paĝa	2 mendoj
Kolekto da kvin artikoloj pri Beethoven-memorlokoj en Vieno de Dr. Karl Beckmann, presita, 16-paĝa	2 mendoj
Esperanto en la Viena Radio de D-ro K.Beckman, fotokopiita, 23-paĝa	2 mendoj
Superrigardo pri Aŭstrio, 1-a parto, ilustrita, fotokopiita, 41-paĝa	4 mendoj
Superrigardo pri Aŭstrio, 2-a parto, ilustrita, fotokopiita, 34-paĝa	4 mendoj
Alpaj pejzaĝoj de Ilse Panaschell, ilustrita, fotokopiita, 30-paĝa	3 mendoj
La mondo en la jaro 1887, de D-ro Karl Beckmann, ilustrita, fotokopiita, 27-paĝa	3 mendoj
Kolekto da ŝercoj kaj spritaĵoj fotokopiita, 25-paĝa	3 mendoj
Konsiloj pri sano de W.Haberl, fotokopiitaj:	
Kajero 1: Sentoj kaj agordoj	1 mendo
Kajero 2: Kiom bone vi povas malstreĉi vin?	1 mendo
Kajero 3: Pri la koro	1 mendo
Kajero 4: Manĝi ĝojigas	1 mendo
Kajero 5: Pezaj problemoj	1 mendo
Kajero 6: Mi sentas min kulpa	1 mendo

Rilate al la formatoj: La presitaĵoj kaj la "Konsiloj pri sano" havas la malpli grandan formaton A5, ĉiuj aliaj eldonaĵoj la grandan formaton A4. Pri Bibliaj Leteroj en esperantigo de Walter Haberl kun indiko de la - facilaj - kondiĉoj de ricevo ni preparis apartan liston, kiun ni disponigos al vi volonte, se vi tion deziras. Bonvolu prikonsideri! Alskribo signifas mendo. Do, se iu presaĵo postulas du, tri aŭ plurajn mendojn, neniam skribu: tio estas mia 2a, 3a alskribo! Ni salutas vin tre amike. Skribu baldaŭ ree. Ni vere bezonas viajn alskribojn! *****

Internacia konferenco pri Komenio

La Karola Universitato en Prago kaj la Universitato Komenio en Bratislava organizas por la tagoj 23.-27.3.1992 internacian sciencon konferencon "Heredaĵo de J.A.Komenio kaj edukado de la homo por la 21-a jarcento". La konferenco traktos en sep sekcioj: 1) La edukado por la 21-a jarcento, 2) La rajtoj de la infanoj kaj evoluo de personeco, 3) Materiaj kaj didaktikaj rimedoj en la kunteksto de la informada teknologio, 4) J.A.Komenio pri la antaŭlerneja edukado kaj lia heredaĵo por la nuntempo, 5) J.A.Komenio kaj signifo de la lingva kaj literatura edukigo, 6) J.A.Komenio kaj "res humanae" kaj 7) J.A.Komenio kaj lia heredaĵo en la agado de eklezioj. En la tria sekcio kunlaboras AIS San Marino (Akademio Internacia de Sciencoj), en kiu laboras ĉefe esperantistoj.

Vladislav Hasala: Kiel propagandi?


Unu el multaj eblecoj, kiel bone kaj efike propagandi nian Esperanton aŭ la Movadon, estas utiligi servojn de nia poŝto. Temas pri ne tro multekosta ebleco: niaj kluboj, sekcioj kaj aliaj organizaĵoj povas pagi klisteton por afrankmaŝina stampilo uzata en koncerna poŝtofiĉejo, kiu per ĝi afrankas milojn kaj milojn da sendaĵoj (tio dependas de grandeco kaj graveco de la koncerna poŝtofiĉejo). Do, per tiu ĉi menciita maniero renkontiĝadas kun Espe-

ranto kaj la Movado multe da homoj enlande kaj kompreneble, ke ankaŭ eksterlande. Nun tiamaniere propagandas E-kluboj en urboj Strážnice kaj Třebíč, sed ankaŭ la oficejo de nia asocio. En Strážnice la afrankmaŝina stampilo estas posedaĵo de Kulturdomo, sub kies tegmento funkcias la loka E-klubo. En Třebíč posedaĵo de la afrankmaŝina stampilo estas la Klubo mem. Pluajn detalojn ktp. Ĉe adreso: Kubo ESPERANTO, poŝtejo 34, 696 62 Strážnice.

Kulturní dům Strážnice



Esperanto klub
CS-69662 Strážnice
tel: 42-631-942 762



ÚČINNÁ PROPAGACE:

Hledáte-li dostupné prostředky propagace esperanta a esperantského hnutí a pokud možno co největším dosahem na veřejnost, pak stojí za povšimnutí jedna z takových metod, kterou nám představuje Klub Esperanto ve Strážnici v příspěvku Vladislava Hasala. V určitých případech lze s výhodou využít služby nabízené naší poštou a předplatit si užívání razítka s propagačním textem u dohodnutého poštovního úřadu. Propagační text razítka se tak dostane prostřednictvím poštovních zásilek do rukou mnoha lidí v Československu i v zahraničí a pronikne tak zcela nenásilnou formou do jejich vědomí. Vždyť poštovní razítka na do-

pise si nelze nepovšimnout. Pokud zvolíte vhodnou velikost písmen a zajímavou kresbu, nelze propagační text přehlédnout či nevnímat. Propagační sdělení zprostředkované poštovním razítkem rovněž nelze odstranit či poškodit, jako když vám strhnou nebo přelepi vaše propagační plakáty. Naopak, filatelisté, bude-li vaše razítko hezké a zajímavé, rádi zaplatí za to, aby se stalo ozdobou jejich sbírky. Prostřednictvím filatelistických exponátů na nejrozsáhlejších výstavách se tak mohou i oni nepřímo stát dalšími propagátory esperanta.

K této informaci je účelné zaznamenat ještě několik technických informací. Podle usta-

novení Přílohy č. 4 k vyhlášce č. 78 z roku 1989, jímž je vyhlášen "Poštovní řád", stanovuje podmínky, podle nichž může organizátor významných událostí požádat, aby po dobu konání této akce pošta používala k orážení zásilek zvláštní příležitostné razítko. Žádosti je nutno podat čtyři měsíce před zahájením akce včetně výtvarného návrhu razítka. Může také požádat o zřízení příležitostné poštovní přepážky po dobu konání akce. Poplatek za používání zvláštního příležitostného razítka, nebo razítkovací vložky do oráženího stroje je stanoven podle délky jeho používání na 200 Kčs za jeden měsíc (každou jeho část). Pokud požádáte o zřízení příležitostné přepážky, zaplatíte za jednu přepážku poště navíc denní sazbu 363,- Kčs. Z hlediska pořizovacích cen asi podstatně nákladnější možností je používání vlastního výplatního stroje s propagační vložkou (a právě příklad otisku tohoto stroje je na obrázku). Výhodné a účelné je využívat výplatní stroj tam, kde je denně odesíláno více listovních zásilek, a proto se vyplatí pro jejich vyplácení a razítkování výplatní stroj zakoupit (v průměru se dnes jeho cena podle výrobce a kvality pohybuje okolo 50 tis. Kčs). Pro jeho používání vydala pošta směrnice, které jsou přílohou "Poštovního řádu". Při jeho používání lze rovněž využít vlastní příležitostné a reklamní vložky. Mějte však na paměti, že jedinou povolenou barvou pro otisky výplatního stroje (a to i u poštovních přepážek!) je barva červená, což může být snadno příčinou nepříjemného překvapení, hodláte-li otisk ozdobit naším symbolem ve tvaru pěticípé hvězdy.

red.

El niaj kluboj:

Plzeň - Miltenberg am Main

Nia pilsena klubo kontaktas de printempo 1991 kun la grupo de esperantistoj el la germanaj bavariaj urboj Miltenberg kaj Burgstadt am Main. En aprilo ili vizitis nin unuafoje. Post ilia vespera alveturo ni renkontiĝis en la restoracio kaj amike diskutis, parolis. La sekvan tagon ni montris al ili nian "bierurbon" - muzeon de biero, subterajn kelojn, preĝejon ktp. kaj poste adiaŭante ni diris kutiman frazon: "Ĝis revido iam ie." Sed danke al ilia grupestro s-ro Kurt Fischer ni baldaŭ ricevis leteron, fotojn, gazetojn, kaj niaj amikaj rilatoj daŭris. Kia estis mia surprizo, kiam mi ricevis proponon viziti iliajn urbojn! Senhezite ni akceptis la afablan viziton kaj ni (3 e-istoj) travivis unu semajnon en belega, pura urbo Miltenberg kaj Burgstadt. Mi loĝis en la familio de s-ino Catarina sentante min kiel hejme. Ĉiutage ni ekskursis aŭtomobile aŭ piede. Ni vidis multajn ruinojn, burgojn, preĝejojn, vilaĝojn, urbetojn, urbojn - ĉio estis nekredeble pura, bele aranĝita - jen modelo por ni, por nia lando! - Ni konatiĝis kun ĉiuj klubanoj - proksimume 10 homoj, plejparte virinoj - en iliaj hejmoj ni estis gastigitaj, akceptitaj kiel familianoj. Tio povas okazi nur inter esperantistoj! Ilia grupo ne havas klubejon, ili lernas, renkontiĝas en hejma medio. La lingvan nivelon "gardas" s-ro Fischer - lia edzino kaj du filinoj regas la lingvon perfekte - modela esperantista familio! La estontecon de nia lingvo garantias tiaj homoj - oferemaj, homecaj, amikaj eĉ trans la limoj.

M. Zýková

Nespice

Ĉijare unuafoje aranĝis klubanoj de Strakonice kaj Pisek en la tagoj 28-30/IV/1991 en la vilaĝo Nespice (Ŝumava) belan E-renkontiĝon.

Partoprenis ges-anoj ne nur proksimaj (Ĉ. Budějovice, Plzeň), sed ankaŭ kelkaj Pragoj, el la urbo Lysá n/Labem, Mělník - kaj kontentaj estis ĉiuj. Krom kurtaj ne laciĝaj promenoj la organizantoj preparis diversajn konkursojn. Por infanoj kaj virinoj ĵetadon de "mikskulero", por viroj ĵetadon de ligna ŝtipo, ankaŭ sak-konkurso kaj similajn ludojn. Mi alte taksas la gramatikan "horetan" de s-ro Soušek - dank' al li ni ripetis aŭ ekkonis frazojn kaj esprimojn ne ofte aŭ ne ĝuste uzatajn. M. Zýková

ITREE

La ercmontara urbeto Nové Hamry ĉijare bonvenigis tradician ITREE-on. Ĉeestis 40 homoj el ĈSFR kaj Germanio, unu gedza paro el Danlando. La medio kiel kutime estis familia, la vetero bona, la regiono pitoreska. Ĉiutage ni marŝis, promenis, parte veturis per la vagonaro ambaŭdirekten - al Potůčky - Johangeorgstadt aŭ al Karlovy Vary. En Johangeorgstadt ni vizitis tre interesan muzeon de minado - dank' al perfekta traduko de s-ro Bormann ni ekkonis ĝian historion. Plej bela estis vespero de ensemblo "Dylen" - dancoj popolaj, naciaj kostumoj, muzikinstrumentoj, sakfluto, popolkantoj el sudbohemia regiono. Bedaŭrinde mankas multaj regulaj partoprenantoj de ITREE - verŝajne pro financaj kaŭzoj. Karlovaranoj denove meritas dankon por tiuj belaj tagoj: mi timas, ke ĉijara ITREE estis por multaj ĉeĥoj "cigna kanto"

- Ĉar venonta aranĝo okazas en Germanio - do, por ni ne facile realigebla pro mon-problemo. - Sed mi malgraŭ tio esperas: ĝis la revido venontjare!

M. Zýková

PARDUBICE

Esperanto-klubo TESLA perdis sian patronon, sed ne pereis kaj nun aktivas sub la protekto de la Kulturdomo Pardubice Dubina. La klubvesperoj okazas en la areo Galanta en kleriga klubo Na dražce ĉiulunde je la 18-a horo. La klubbejo estas atingebla per la urbaj trafikiloj n-ro 8 kaj 13. Al la nova periodo de sia agado la klubo kontribuis jam per sia Sesa Esperanto-Tago la 12-an de oktobro kun la partopreno de 45 vizitintoj el lokoj proksimaj kaj foraj.

En bunta programo prezentis sin la infanoj kaj junularo per bona Esperanto. La renkontiĝon spicis per sia rakontado s-ro Richard Howard galanta en kleriga lingvon. Per humorplenaj vortoj li tuŝis la gravan problemon de lernado kaj instruado de la naciaj lingvoj.

La vizito de supermoderna naĝbaseno enportis interesan distron en la E-programon.

La 4-an de novembro okazis plua aranĝo, la Letervespero. Salutis ĝin 89 esperantistoj el 26 landoj, la korespondemuloj estis kontentaj. Ankaŭ en la estonto la regulaj klubkunvenoj ĉiusemajne servos al la klubanoj per E-aktualaj kaj amuzaj programoj kun konversacio por altigi ilian lingvan nivelon kaj aŭtune okazos jam la Sesa Esperanto-Tago.

Linhart Rýznar

Kiel esperantistoj komunikas

Se esperantistoj ĉe siaj interparoloj uzas aliajn esprimilojn ol Esperanton, ili fariĝas ĝirafoj, krokodiloj, aligatoroj, kajmanoj aŭ gavialoj. Ni klarigu tiujn metaforojn:

- ĝirafi:** helpi al si pantomime per gestoj, kiam mankas vortoj
- krokodili:** paroli la gepatran lingvon antaŭ eksterlandaj esperantistoj
- aligator:** paroli en esperantista medio nacian lingvon, kiu estas gepatra sole por parto de interparolantoj (ekz. hungaro kun germano germane)
- kajmani:** paroli en esperantista medio nacian lingvon, kiu estas gepatra por neniu el la interparolantoj (ekz. hungaro kun rumano germane)
- gaviali:** paroli esperantlingve ekster esperantista medio, ekz. demandi surstrate Esperante, kie troviĝas banko, kiam oni ne scipovas la lingvon de la loka loĝantaro.

La plej famaj estas la krokodiloj, ĉefe dum la Universalaj Kongresoj, sed tie aperas ankaŭ la aligatoroj kaj kajmanoj. Ĝirafojn ni konas ekzemple el SET Lančov, kie ili ŝatas kastori, alivorte ĉasi kastorojn (24 horojn paroli nur en Esperanto sen eĉ unu vorteto alilingva). Pri la gavialoj informis nin s-ro Richard Howard, angla esperantisto loĝanta en Prago. Gavialo estas parenco de krokodilo, aligatoro kaj kajmano, komune ili formas ordon de krokodiluloj, kiu apartenas al la klaso de reptilioj (rampuloj) komune kun serpentoj, testudoj, saŭroj kaj lacertoj. Sed gavialo-esperantisto ŝajnas eĉ pli simpata ol ĝiraf-esperantisto, ĉu? Belan gavialadon en la nova jaro!

Pár slov o krokodýlování

Když se esperantisté v esperantském prostředí dopustí té neslušnosti, že se baví svojí mateřštinou a ostatní jim nerozumějí, říkáme tomu krokodýlování (krokodilado) a takoví esperantisté získávají čestný titul krokodýlů. Když je národní jazyk mateřštinou pouze pro některé z nich (např. Maďaři s Němci se baví německy), stávají se z nich samideáni aligatóři. Pokud národní jazyk není mateřštinou žádného z rozmlouvajících (např. Maďaři s Rumuny německy), jsou to praví a nefalšovaní kajmani. O žirafách mluvíme, když někdo nedostatečnou zásobu esperantských slověk posiluje živou gestikulací s uměleckými prvky pantomimy. Bobříci jsou esperantisté, kteří se na esperantském táboře dokázali aspoň 24 hodin vyjadřovat jen esperantem. V praxi se často rekrutují právě z žiraf. V poslední době byl zaznamenán nový typ esperantského živočicha, který v cizích zemích útočí na kolemjdoucí a esperantsky se jich dotazuje, kde se nachází banka, muzeum, nádraží, toaleta a jiné pamětihodnosti. Kupodivu se často domluví a ochotní chodci se sami diví, jak krásně rozuměli, i když nemají tušení, kterou řečí na ně bylo promluveno. Pro tyto čilé samideány navrhuje náš anglický přítel žijící v Praze Richard Howard čestný titul gaviala, aby si tak naši plazové zlepšili kádrový profil a obstáli při lustracích.

Arbohakisto kaj Ĉielfeino - korea popola fabelo

El la korea tradukis Choe Taesok

Iam vivis junulo, kies hejmo troviĝis ĉepiede de la monto Diamanto (Kumgangsan) en la nordo de la provinco Kanguondo (Kangwondo). Li estis vere malriĉa. Por gajni vivopanon li ĉiutage iris al la monto haki arbojn por brulligno kaj vendis ilin al siaj najbaroj. Liaj samaguloj ĉiuj jam edziĝis, sed li estis tiel povra, ke li ne povis trovi por si edzinon. Tamen li estis tre honesta kaj konscienca junulo, kiu diligente laboris kaj neniam plendis pri sia malfacila sorto. La vilaĝanoj bone konis lin kaj ofte diris pri li: "Ĉe se ne aperus la suno, neniam estas la tago, kiam la sono de lia hakado ne aŭdiĝas en la monto."

Iun tagon, kiam li estis hakanta arbon kiel kutime, li aŭdis ion kuranta sur la falintaj folioj. Tio estis tre neordinara, kaj li momente ĉesis labori. Li ekvidis suferantan junan cervon antaŭ si. Apenaŭ ĝi atingis lin, ĝi petegis varmkore de li helpon, ĉar ŝajne ĝi alfrontis grandan danĝeron. Li simpatiis kaj senhezite kaŝis la cervon sub stako da brulligno. Poste li daŭrigis sian laboron, kvazaŭ nenio okazus.

Tuj post momento iu ĉasisto alkuris anhelante antaŭ lin kaj furioze diris - "Hej, misulo! Mi nun persekutas cervon, kiu forfuĝis ien ĉi tien. Ĉu vi ne vidis ĝin?" - La grandkorpa ĉasisto staris vidalvide al la arbohakisto kun siaj pafarko kaj sagoj en la manoj. Kvankam padoj estis sufiĉe konataj al la ĉasisto, tamen li malfacile moviĝis inter arboj kaj sur krutaj deklivoj. Lin fikse rigardis la arbohakisto kaj stoike respondis: "Jes, mi vidis la cervon. Ĝi preterkuris min kaj kiel sago forkuris tien malsupren al la valo kaj malaperis de mia rigardo. Bedaŭrinde mi do ne povas sciigi vin kien ĝi fuĝis poste." Tiel la ĉasisto impetis senprokraste malsupren de la monto.

La bela cervo elpaŝis el stako de brulligno, kie ĝi kaŝiĝis eĉ ne kuraĝante spiri, kaj plenkore dankis la arbohakiston pro lia afabla helpo. Plorante pro sia neforgesebla dankemo, la cervo diris al li, - "Vi savis mian vivon kaj mi estas plej profunde dankema al vi. Por rekompenci vin mi diros al ĉielaj feinoj malsuprenveni el la angulo de la ĉielo por sin bani en la lagoj. Antaŭ la bano ili senvestiĝos kaj pendigos siajn silkajn robojn sur la ĉerandaj pinarboj. Vi nevidebla por ili ŝtelume iru kaj kaŝu unu el iliaj vestoj. Sekve, post la bano unu el ili ne povos reveni al la ĉielo. Tiam vi iru al ŝi kaj bonvenigu ŝin. Ŝi sekvos vin al via hejmo kaj vi feliĉe vivos kun ŝi kaj naskigos infanojn. Sed vi ne devos redoni al ŝi la robon, ĝis vi havos kvar infanojn". La cervo malaperis kiel vento dum la junulo miris kaj ekstaze plezurigis pro ĝiaj vortoj.

La sekvan matenon la arbohakisto vekiĝis pli frue ol kutime kaj kun granda scivolemo grimpis al la pinto de la monto Diamanto, kie troviĝas ok belaj bluakvaj lagoj. La monto estas tiel pitoreska, ke rilate ĝin ekzistas malnova proverbo: "Ne parolu pri vidaĵa beleco, antaŭ ol vi vidos la monton Diamanto". Ĝi situas malproksime de la tumulto de ĉiutaga vivo kaj estas konsiderata de pratempo kiel sankta loko tial, ĉar tie estis konstruitaj multaj budhismaj temploj. Iliaj krutegaj pintoj

ŝajnas esti alflugontaj en la lazuran ĉielon. Arboj, kreskantaj ĉirkaŭ ili dum pluraj jarcentoj, formas densajn arbarojn, kien taglumo apenaŭ penetras. Riveretoj kristalpuraj fluas inter la rokoj en la valoj kaj de loko al loko troviĝas lagoj kaj akvofaloj belmelodiantaj kun la kantoj de birdoj kaj krietoj de bestoj.

La junulo kaŝis sin inter arbustoj kaj atendis, ĉu vere io okazos. Subite en angulo de la ĉielo ekmoviĝis la nuboj kaj ok graciaj ĉielulinoj surnube laŭ ĉielarko deflugis al la lagoj ĉe la ĉielarka fino. Ili gaje babilis kaj ĉiuj kune demetis siajn robojn kaj pendigis ilin sur pinarboj. Poste ĉiuj ensaltis en la puran akvon de unu el la ok lagoj. Kiam ili naĝis en la akvo, la arbohakisto sorĉoravite fiksigardis ilin. Post iom da tempo li revenis al sia konscio kaj rememorigis al si la konsilojn de la cervo. Li ŝtelpaŝis al la pinarboj kaj deprenis la robon apartenantan al la plej juna ĉielulino.

Ĉe la sunsubiro la feinoj preparis sin por reveni al la ĉielo. Ili komencis surmeti siajn robojn, sed konsternite, la plej juna feino nenie povis trovi la sian. La ceteraj ne povis atendi ŝin kaj ili grimpis sur la ĉielarko kaj ĉiuj, lasinte ŝin sola sur la tero. Ŝi staris tie ekstreme embarasita, sin ĉagrene demandante, kie trovi la vestojn. Post momento ŝi ekvidis neatendite la junan arbohakiston alproksimiĝi al ŝi. Jam preskaŭ mallumis. Li profunde afliktiĝis pro tio, ke li kaŭzis grandan ĉagrenon al ŝi kaj ne povis ne pardonpeti ŝin tutkore. Li estis tre afabla al ŝi kaj kondukis ŝin al sia hejmo.

Komence la ĉielulino trovis kutimojn de surtera vivo ege konfuzaj kaj malfacilaj, sed tagon post tago ŝi bone adaptiĝis al hejma vivo. Feliĉe pasadis monatoj kaj ŝi jam naskis unuan infanon. Ŝia juna edzo dronis en la abismo de ĝojo kaj feliĉo kaj multe amis ŝin per sia tuta koro. Ankaŭ lia patrino partumis ilian feliĉon.

La ĉiela feino aspektis tute kontenta kaj vivis en harmonio kun sia surtera familio. Kiam ilia dua infano naskiĝis, ili estas pli feliĉaj ol antaŭe.

Iun tagon la edzino petis sian edzon redoni al ŝi la ĉielan robon, dirante: "Ni jam ja havas du infanojn. Ĉu vi ankoraŭ ne fidus al mi?" - Sed ŝia edzo rifuzis, ĉar li timis, ke ŝi povus elporti iliajn du infanojn en la ĉielon ĉirkaŭprenante po unu per ĉiu sia brako.

Kiam naskiĝis la tria infano, ŝi denove petegis lin redoni siajn vestojn. Ŝi preparis al li bongustajn manĝaĵojn kaj rizvinon, pene strebante mildigi lian suspekton. - "Ho, mia plejkarulo, nun ni havas tri infanojn. Bonvolu lasi min vidi mian ĉielan veston. Mi ne povas perfidi vin nun, ĉu jes?"

La edzo simpatiis la sentojn de sia edzino kaj senbedaŭre montris al ŝi la veston, kiu estis tiel longe kaŝita en sekreta loko malantaŭ la domo.

Sed ve! Kiam ŝi surmetis ilin denove, ŝi regajnis sian magian forton kaj tuj suprenflugis al la ĉielo, prenante du infanojn per siaj brakoj kaj la trian inter la kruroj.

Netolerebla malĝojo kaj ostoraspa kordoloro falis sur la edzo kaj li severe riproĉis sin pro tio, ke li ne finsekvis la konsilon de la cervo. Li iris al la monto por haki arbojn kaj

Burgjero Gotfredo Aŭgusto: PER MIRIGAJ AVENTUROJ PIPRITA VOJAĜO
RUSUJON DE LA BARONO FONMUNKHAŬZO, el la germana tradukis prof.
Ŝulco Rikardo, Esperanto-Centro Paderborno 1991, 32 paĝoj, forma-
to A5, prezo ne indikita

konsilon de la cervo. Li iris al la monto por haki arbojn kaj sidadis en la sama loko, kie li antaŭe vidis la cervon, esperante ĝian reaperon. Bonŝance ĝi trapasis tiun vojeton kaj li povis rakonti al ĝi la tristan rakonton. La cervo denove konsilis al li: "De post la tago, kiam vi kaŝis la robon de la ĉiela feino, ili ne plu venis bani sin tie. Se vi deziras serĉi viajn edzinojn kaj infanojn, vi mem devas iri al ili. Feliĉe ekzistas vojo. Iru morgaŭ al la sama lageto kaj atendu. Ĝis vi vidos sitelon kun ŝnuro malsuprenigi de la ĉielo. Ili faligas ĝin por ĉerpi bancele la akvon. Kaj en la sitelo vi enigu vin anstataŭ la akvon. Ili tuj suprenigos la sitelon, ĉar ili ne scias, ke vi estos en ĝi. Tio estas ununura vojo ebligi al vi la renkontiĝon kun via familio en la ĉielo." Post la rakonto la cervo malaperis.

La arbohakisto sekvis la konsilon de la cervo kaj per la sitelo supreniris la ĉielon. Li bonorde alvenis al la ĉielaj feinoj. Ili kriis: "Tie ĉi odoras homo!" - kaj vere trovis la arbohakiston en la sitelo. Ili demandis lin, kiamotive li enĉieligis. Li emocie rakontis la tutan historion kaj estis kondukita al la ĉiela reĝo. Tie li renkontiĝis kun siaj infanoj kaj la edzino, kiu estis amata filino de la reĝo.

La reĝo permesis al li resti tie kaj li vivis tre feliĉe en la ĉiela reĝlando. Ĉiutage li manĝis plej bongustajn manĝaĵojn kaj vestis sin per plej bela vesto. Estis nenio zorgiga por li.

Tamen iun tagon li plene bedaŭre pensis pri sia maljuna patrino, kiun li forlasis sola sur la tero kaj diris al sia edzino, ke li ŝatus viziti ŝin. Sed lia edzino petis lin ne iri, ĉar se li malsuprenirus, li eble ne povos denove reveni al la ĉielo. Sed li tamen persistis en sia peto kaj firme promesis reveni sen malsukceso. Finfine lia edzino cedis al lia deziro kaj diris - "Mi ricevos por vi drakoĉevalon. Vi rajdos sur ĝi, kaj ĝi alportos vin al la tero. Sed en ajna okazo ne elseliĝu. Ĉar se vi eĉ tuŝos la teron, vi neniel povos reveni al mi."

La arbohakisto surseliĝis kaj alvenis al sia kompatinda patrino. Ŝi tre ĝojis revidi sian filon post lia longa foresto. Ili ĝue interbabiladis. Kiam li adiaŭis ŝin kun larmoj ankoraŭ rajdante la drakoĉevalon, lia patrino diris al li - "Mi kuiris kukurbkaŝon. Bonvolu manĝi almenaŭ umu bovlon de ĝi". Li ne emis malĝojigi ŝin kaj prenis la bovlon donitan de ŝi. Sed la bovlo estis tiel varmega, ke li ne povis firme transpreni ĝin kaj faligis ĝin kontraŭvole sur la ĉevalan dorson. Sekve, la ĉevalo baŭmis fortege, elĵetante lin sur la teron. Laŭte henante la drakoĉevalo alflugis en la ĉielon kaj malaperis de liaj larmplenaj okuloj.

La arbohakisto tial neniam povis reveni al la ĉielo kaj staris ĉiutage kun larmoj de pento kaj malĝojo, gapante al la ĉielo. Fine li ĉesis vivi pro korŝira malĝojo kaj reenkarniĝis en virkokon.

Tial tradicio diras, ke la kaŭzo, kial virkokoj grimpas al la plej alta loko kaj kokerikas kun la kolo eltendita al la ĉielo, estas tio, ke la spirito de la arbohakisto eniĝas en ilin kaj serĉas lokon la plej proksiman al la ĉielo, kiun ĝi laŭeble povas trovi.

Lerta kaj sperta leganto certe jam elrebusigis, ke temas pri aventuroj de la glora barono von Münchhausen verkita de la klasika germana poeto Gottfried August Bürger kaj esperantigita de Richard Schulz laŭ la principoj de lia fama Analiza Skolo. En la ĉeĥa lingvo ni konas la bravan heroon sub la nomo "baron Prábil" (= Blagulo, Blufulo, Gaskono, Ŝerce Mensoganta Babilanto), kion antaŭ pluraj jardekoj iu esperantigis per malbela nomo "barono Mensogbabilulo". Nun eniras la Esperantujon nova nomo Fonmunkhaŭzo formita laŭ la jam menciitaj principoj de la Analiza Skolo. El aliaj principoj de la skolo estas plej okulfrapa la neuzo de refleksivo post genitiva "de" (... reĝoj kaj reĝinoj ... neniam ekvidis armeon en batalaranĝo krom la paradojn de ilia gvardio), kio konfliktas kun la Fundamento. La regulon enkondukis Ludoviko Mimoo Espinalto asertante, ke post la genitiva "de" necesas subkompreni "kiu estas", ekz. "li vidis hundon, kiu estas de lia najbaro", sekve necesas diri "li vidis hundon de lia najbaro" anstataŭ la laŭfundamenta "li vidis hundon de sia najbaro." Laŭ la sama logiko oni ne rajtus diri "li vidis sian hundon", ĉar "li vidis hundon, kiu estas lia". Tamen eĉ la Analiza Skolo akceptas "li vidis sian hundon" kaj la Ekzercaro de la Fundamento donas tri klarajn ekzemplojn pri refleksivo post genitiva "de" (ŝi estis portreto de sia patro, li faris tion per la dek fingroj de sia mano, la reĝido gvidis ŝin en la pa-

lacon de siaj gepatroj)). Kaj tio devas esti decida por ĉiu vera esperantisto.

Malgraŭ la menciitaj riproĉetoj necesas diri, ke la traduko estas stile lerta kaj ni povas bedaŭri, ke la verko ne estas tradukita komplete, kaj ke mankas la mondfamaj ilustraĵoj de Gustav Doré. La kajero enhavas kvin ĉapitrojn: vojaĝon al Rusujo kaj Sankta Petroburgo, ĉashistoriojn de la barono, pri hundoj kaj ĉevaloj de la barono, aventurojn de la barono en la milito kontraŭ Turkoj kaj aventurojn de la barono dum lia kaptiteco ĉe la Turkoj kaj lia reveno en la hejmlandon. La legantoj povas amuzi sin per famaj historietoj, ekz. pri cervo paŭtrafita per ĉeriza kerno, el kiu dum du jaroj elkreskis inter la kornaro ĉerizujo, kiun rakontas ankaŭ la ĉeĥa "baron Prábil" en la klasika filmo kun Vlasta Burian, reĝo de ĉeĥaj komikistoj. Ni ne forgesu ankaŭ la filmon Baron Prábil de reĝisoro Karel Zeman kun Miloš Kopecký kiel ĉefrolulo.

Miroslav Malovec





Korespondi deziras

El Pollando:

*** **Lukasz Baran**, Gora Ropczycka 27, 39-120 SEDZISZOW Mlp., woj. Rzeszow; 19-jara lernanto de teknika lernejo, li interesiĝas pri muziko, sporto (tabloteniso) kaj aŭtomobiloj *** **Andreo Albertowicz**, ul. Niepodległości 6/3, 14-420 MLYNARY; 14-jara lernanto, li kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, fotografaĵojn, liaj hobiaj estas esperanto kaj turismo *** **Beata Zoinowska**, 28-j instruistino, ul. Flisacza 35/2, 74-100 GRYFINO *** **Brygita Biaszczyk**, 28-j oficistino, ul. Luzycka 3c/1, 74-100 GRYFINO *** knabineto 7-j, E-e kaj angle, reciproka gastigado: **Magda Druch**, str. Barlickiego 3/2, 45-083 OPOLE *** **Halina Dziedzic**, 40j, 32-045 SMOSZOWA I 40, woj.m. Kromow *** **Adam Marcinkowski**, 20j, Dworcowa 8/2, 67-115 BYTOM ODEZ., moderna muziko, danco *** **Grzegorz Wieczorek**, 97-213 SMARDEEWICE, ul. Wesota 28, 27j, turismo, muziko, sporto *** **Andreo Bobkiewicz**, La 1-a Socia Mezlernejo en Opole, str. Oleska 129, 45-233 OPOLE, 33-jara instruisto pri literaturo kaj interlingvistiko ***

El Ĉeĥoslovakio:

*** **Eva Kučková**, Jirovska 187, 783 06 DOMAŠOV n. Bystř.; 19-jara esperantistino, ŝi interesiĝas pri internacia korespondado, pri belartoj kaj moderna muziko, pri sporto, ŝi ŝatas naturon kaj ĉevalojn *** **Lukáš Daněš**, Jirovcova 17, 623 00 BRNO; 12-jara lernanto volas korespondi kun eksterlandaj esperantistoj, li interesiĝas pri muziko, pri belartoj, pri atletiko, li kolektas poŝtmarkojn ***

El Litovio:

*** **Esperantista Klubo "Arto"**, A.D. (P.K.) 52, TELSIAI, 5610, volas ligi rilatojn kun ĉeĥoslovakaj gesamideanoj *** **Dalia Tikužytė**, 20j, Debreceno 62-36, 235 819 KLAIPEDA ***

El Ruslando:

*** **Vjačeslav Semenov**, 192 283 S. Petersburg, ul. Malaja Balkanskaja, D. 30/3, kv. 189, 30-jara, kolektas bildkartojn *** **Olga Borodina**, Lenina 120-13, KRASNOJARSK, 660017, 15-jara, volas korespondi esperante, angle; volas interŝanĝi kalendarojn, bildkartojn *** **Surina Sveta**, Krasnojarskij Raboĉij 109-49, 660025 KRASNOJARSK, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn, 15-jara *** **Valentina Šegal**, 327 018 NIKOLAEV, per. Kobera d. 13a-816, 39-jara esperantistino ***

El Estonio:

*** **Kalju Junts**, 203181 Haapsalu Raj, Ridala z/n, PARILA, Estonio, 34-jara, kolektas bildkartojn, monerojn ***

El Ukraino:

*** **Valentina Pošysajeva**, ul. Šengelija 5-47, XERSON, 325 021, 42-jara instruistino ***

*** Feliĉan novan jaron 1992 ! ***

Ivan Blatný
Říkadlo

Rimaĵo

Zeptala se lišky liška,
co by chtěla na ježíška.
"Jistě", povídá ta liška,
co se jí ta první liška
ptala, co chce na Ježíška,
"nejlepší by byla knížka".
Vtom však hajný Melíšek
našel jejich pelíšek.
"Rychle", povídá ta liška,
ta, které ta druhá liška
řekla, co chce na Ježíška
(říkali jí Eliška),
"vidím pana Melíška".
A tak rychle obě lišky
vzběhly z podzemní chýšky,
rychleji než Melíšek
uměl střílet do lišek.
Smíchem se pak druhá liška
(té říkali Pampeliška)
i ta první Eliška
popadaly za bříška.

Petis vulpo de vulpino:
kion trinki ĉe jarfino?
"Certe," - diktas la vulpino
al la vulpo laŭ kutimo
pri trinkado ĉe jarfino,
"plej bongustas ruĝa vino !"
Sed subite stranga sono:
la ĉasisto Primadono
skoltis ĝis la vulpa domo.
"Dio!" - krias la vulpino,
kaj pri trinko ĉe jarfino
vanas por ŝi tuj ordono,
"venis brava Primadono!"
El subtera vulp-kabano
ŝi elsprintas kun kompano,
pli fulme ol Primadono
scias pafi per kanono.
Pro ridego jam sen timo
la ge vulpoj antaŭ pino,
Rufulo kaj Ruzulino
kapriolas en ravino.



traduko de Miroslav Malovec

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 1

*** STARTO ***

presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10,
110 01 Prago 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare.
Respondeca redaktoro: Miroslav Malovec;
administrato: Karel Daněk, STARTO, poŝtfako 425,
CS- 660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio. Abonebla ĉe niaj
perantoj, ĉe UEA, aŭ rekte ĉe nia asocio.

Nepravideľný vĕstník Ĉeského esperantského
svazu. Vychází 6x ročně. Obdrží členové svazu.
Odpovědný redaktor: Miroslav Malovec;
administrátor: Karel Daněk, STARTO, pošt.p. 425,
660 25 Brno 2.

NOVINOVÉ
DOPLATNÉ

Dohlédací pošta Hodonín 1
Povoleno JmĚS Brno,
č.j. P/3-8847/91
ze dne 28.8.1991.